The screenshot shows a radio broadcast interface. At the top, it says 'Stand: 22.09.2012 11:45 Uhr'. The main title is 'In Hamburg lebt die Sprache der Hoffnung' by Birgit Broecheler. Below the title, there is a short text snippet: '„Saluton“ grüßt Jürgen Wulff in die Runde. „Saluton“ rufen einige zurück, andere fragen sofort: „Kiel vi fartas?“ - „Wie geht's dir?“. Eine seltsam klingende Sprache erfüllt den Kulturladen im Hamburger Stadtteil St. Georg. Jürgen Wulff trifft sich hier jeden Donnerstagabend mit einigen Mitstreitern. Sie gehören zum IF Hamburger Esperanto-Verein und wollen die künstliche Sprache mit Leben füllen. Die Neugier und der Wunsch nach grenzenloser Kommunikation eint sie. Denn Esperanto gehört zu keinem Land und kann doch überall gesprochen werden.' Below this is a section titled 'Treffen der Hamburger Esperantisten' with a '1 von 10' indicator. There is a photo of two people looking at a book. At the bottom, a caption reads: 'Ein Großteil der Esperanto-Wörter stammt aus romanischen Sprachen, aber auch germanische und slawische Wörter sind darin enthalten. Dennoch werden Wörterbücher im Unterricht eher selten gebraucht.'

Auf Augenhöhe durch Esperanto

„Was ist die Muttersprache eines anderen sprachlos, bis ich ihm gegenüber im Raum. Wenn Esperanto gelernt ist, ist es auf Augenhöhe“, sagt Birgit Broecheler. Sie ist die jüngere Wulff und zehnjährige Esperantistin. Wulff ist Vorsitzende des Hamburger Vereins. Hier gibt es Programm für die Mitglieder. Bitte helfen, Esperanto andersherum zu lernen.

Zamenhof's Vision

128 Jahre sind her, dass Ludwik Lejzer Zamenhof die künstliche Sprache schuf. Der polnische Arzt der 1880er an Nowy Jorker Eltern in einem getrennten Gebäude geboren wurde, war der besessene, mehrsprachige und Sprachliebhaber. Wulff sagt: „Wulff ist ein Mensch, der die Welt durch Esperanto verbinden wollte.“ Zamenhof ist ein Mann, der die Welt durch Esperanto verbinden wollte. Er ist ein Mann, der die Welt durch Esperanto verbinden wollte. Er ist ein Mann, der die Welt durch Esperanto verbinden wollte.

Esperanto als Arbeitssprache in Hamburg

Esperanto wurde in den 1920er Jahren in Deutschland und Schweden, am 10.01.1921 in Schweden, im Fall in Hamburg, wurde 1921 der Esperanto-Ausschuss in Hamburg gegründet. Die erste Esperanto-Sprachschule wurde in Hamburg gegründet. Die erste Esperanto-Sprachschule wurde in Hamburg gegründet. Die erste Esperanto-Sprachschule wurde in Hamburg gegründet.

Nazi-Regime setzt Spione gegen Esperantisten ein

Im Zweiten Weltkrieg machte Hitler die Esperanto-Bewegung den Nazis. Die Nationalsozialisten waren der in Esperanto eine jüdische Bewegung und lassen die Verordnungen ab 1933 erlassen. Viele Esperantisten hatten eigene Spione, die Esperanto sprachen“, sagt Vorstandsvorsitzender Wulff. Zurück zu seinen eigenen Hamburger Esperantisten, noch als Geiseln in der Hinterzimmer des Café Holtenauer in der Cafékonter. Als Geiseln und Teilnehmer an Esperanto-Kursen, unter auch diese Mitglieder, einige Monate nach Kriegsende sind der Hamburger Esperanto-Verein reorganisiert.

„Ebla“ - internationale Atmosphäre ohne Sprachprobleme

„Ebla“ - internationale Atmosphäre ohne Sprachprobleme. In der Welt der Esperanto-Organisationen sind die Esperanto-Organisationen weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache. Die Esperanto-Organisationen sind weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache. Die Esperanto-Organisationen sind weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache. Die Esperanto-Organisationen sind weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache.

Aufsuchung durch Internet

Aufsuchung durch Internet. In der Welt der Esperanto-Organisationen sind die Esperanto-Organisationen weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache. Die Esperanto-Organisationen sind weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache. Die Esperanto-Organisationen sind weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache. Die Esperanto-Organisationen sind weltweit und Esperanto eine wichtige Sprache.

Ne nur dum jubileoj sed plej ofte tiam ĵurnalistoj retrovas Esperanton kiel temon. Tiel estis por kontribuo al la reta ĵurnalo de NRD.de. La ĵurnalistino Birgit Broecheler raportis pri Esperanto Hamburg. La 125-jara jubileo de Esperanto kaj la 30-jara jubileo de la kulturbutikio St. Georg in Hamburg estis la kialo por kontakti la grupon. Dum du jaŭdaj klubvesperoj s-rino Broecheler vizitis la grupon, demandis sincere kaj amike, intervjuis kaj fotis. La rezulto estas bela artikolo kun fotogalerio kaj ligoj al Esperanto Hamburg, lernu.net kaj al radioestis de 2009 okaze de la nakiĝtagreveno de Zamenhof. Plej grave por la ĵurnalistino estis la internacienco de la grupo, la historio de Esperanto kaj la rilato de la grupanoj al Esperanto. Eble bona inspirado por aliaj grupoj. La artikolon vi trovos tie: <http://www.ndr.de/regional/hamburg/esperantohamburg101.html>.

Bericht über das LERNFEST 2012 in Saarbrücken

Das „Lernfest“ fand am Sonntag, dem 2. September im „Deutsch-Französischen Garten Saarbrücken“ statt.

Der Saarländische Esperanto-Bund und das Becker-Meisberger-Institut präsentierten dort zwei Pavillone mit einem Raterad und einer Minischule, um das angekündigte „Internationale Sprachexperiment“ zu ermöglichen.

Das Lernfest besuchten ungefähr 20.000 Menschen aus der ganzen Region, die zumindest unsere beiden Esperanto-Pavillone sehen konnten.

An unserem Sprachexperiment haben über dreihundert Besucher aktiv teilgenommen.

Natürlich wurde unser Stand auch vom neuen Kultusminister Ulrich Commerçon besucht, der sich dort auch sehr genau über die Kampagne des Saarländischen Esperanto-Bundes

informierte. Das Sprachexperiment selbst wurde in drei Teilen durchgeführt: Zuerst sollten die Teilnehmer einen wissenschaftlichen Fragebogen ausfüllen.

Danach unterrichteten sie sich in der „Minischule“, wo der 2. Vorsitzende des Saarländischen Esperanto-Bundes, Edgar Werner Müller, eine Lektion des bekannten Fernsehkurses „Mazi en Gondolando“ vorführte und einen kurzen Überblick über Esperanto vermittelte.

Danach kamen sie zum Raterad um ihre gerade erworbenen neuen Sprachkenntnisse auszuprobieren.

Erstaunlich oft wurden dort die Esperanto-Ausdrücke sehr gut in die deutsche Sprache übersetzt.

Die erfolgreichen Teilnehmer bekamen dann für ihren Lernfest-Pass einen Klebekupon ausgehändigt. Bei mindestens 5 gesammelten Aufklebern konnten sie dann an der großen Tombola teilnehmen und tolle Gewinne erhalten.



Pavillon des Saarländischen Esperanto-Bundes mit Infomaterial vom D.E.B. und Literatursammlung Foto: Herbert David



Oliver Walz gibt, umlagert von Interessenten, Erläuterungen zum „Raterad“ Foto: Herbert David

Die Teilnehmer konnten daher sehr leicht feststellen, dass mit einem Minimum an Unterricht und auf der Grundlage anderer Sprachkenntnisse (z.B. Latein, Französisch, Englisch) es sehr leicht möglich war, relativ schwierige Ausdrücke in der Internationalen Sprache Esperanto zu verstehen und ins Deutsche zu übersetzen.

Oliver Walz, der Vorsitzende des Saarländischen Esperanto-Bundes zog das Fazit, dass das Lernfest eine sehr kommunikative und visionäre Veranstaltung ist, daher auch

außerordentlich nützlich, um die langfristige Strategie des Saarländischen Esperanto-Bundes zu realisieren.

Ganz gewiss wird der Saarländische Esperanto-Bund zusammen mit dem Becker-Meisberger-Institut auch beim Lernfest 2013 wieder mit dabei sein.

Informationsdienst des Saarländischen Esperanto-Bundes e.V. Alter Hangarten 2, DE-66440 Blieskastel, www.esperanto-saarland.de, <http://becker-meisberger-instituto.org>, sel@esperanto-reto.eu.

Estonto por Bavara Esperanto-Ligo!

Ĝis nun Bavara Esperanto-Ligo (BELO) sub gvido de la aktivema prezidanto Bernd Krause regule ofertis aranĝojn, aparta komisiono pri enkonduko de Esperanto en lernejojn eĉ kontaktis la Bavaran Kulturministerion, imitinda agado. En aprilo 2012 Krause redonis sian postenon pro troa profesia ŝargō. Tio estas normala.

Poste regis silento. Subite venis la novaĵo, ke la BELO-anoj kunvenos la 13an de oktobro por diskuti la sorton de BELO, ĉar ne troviĝis nova estraro. Nur la trezoristo Pit Hauge pretis daŭrigi sian laboron. Oni volis eĉ pripensi, malfondi BELO. Ege strange, ke neniu informis pri tio la estraron de Germana Esperanto-Asocio (GEA).

Kiam tiu ĉi numero de *Esperanto aktuell* aperos, la BELO-membraro jam estos decidinta, espereble por estonto de BELO. Kia ajn estas la rezulto, tasko de GEA estas, serĉi novajn laborpretajn aktivulojn en Bavarujo por daŭrigi la historion de BELO. Sen Bavara landa ligo GEA ne estas imagebla.

Rudolf Fischer

Kaŝitaj trezoroj de KELI en Ercmontaro

„Kaŝitaj Trezoroj“ logis 60 KELLanojn el 11 landoj de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto al Ercmontaro. La ĉijara kongrestemo de la Kristana Esperantista Ligo Internacia rilatis al la iamaj vivkondiĉoj en la montaro apud la ĉeĥa landlimo, kiam la plejmulto laboris en minejoj serĉante ercojn.

Wolfram Rohloff, luterana pastro en Zöblitz, havis la ideon okazigi la KELI-kongreson en sia paroĥo, nome en la kristana klerigejo Hüttstattmühle, kiu fakte montriĝis ege taŭga loko. La partoprenantoj ĝuis la situon meze en arbaro, la bonan manĝaĵon, la varian kaj interesan programon kaj ĉefe la revidon kun konatoj kaj geamikoj.

La strikta tagordo antaŭvidis ĉiutage matenan preĝon antaŭ la matenmanĝo, kantadon de la 9a ĝis 9:45 horo, prelegojn de la 10a ĝis tagmeze, poste paŭzon ĝis la 15a horo kaj denove du aŭ tri prelegojn ĝis la

vespermanĝo. La prelegoj, ofertataj de partoprenantoj, kovris vastan laŭteman kampon: kaŝitaj trezoroj, kristanaj fontoj, gramatikaj pingloj, Hieronimo de Prago, la religia situacio en Estonio, la Hajdelberga kateĥismo, la apokrifaj evangelioj de Maria Magdalena, perloj kaj porkoj kaj kaŝitaj trezoroj en la biblio, la diferenco inter lingvo kaj pensado, pilgrimanto sur Jakobaj vojoj ktp. La prelegantoj reprezentis jes diversajn pensmanierojn sed ne provokis akrajn diskutojn aŭ penajn provojn konvinki la aliajn de la propra opinio. Oni povis elteni, ke la aliaj restas grandparte ĉe siaj opinioj.

Laŭ kongresa tradicio la programo ankaŭ enhavis du ekskursojn: la tuttaga gvidis al Seiffen, kie oni produktas lignajn ludilojn, kaj al Neuhausen, fama pro la nuksorompila muzeo, la duontaga ekskurso estis migrado tra la malvasta valo de la Nigra Pockaŭ. Tie Wolfram klarigis la sistemon de kanaletoj, kiuj transportis la akvon al la minejoj.

Kompreneble ne mankis vespera programo. Elstaris la orgenkoncerto de Ernst Leuze (eklezia muzikdirektoro) kaj Elisabeth Rohloff (sopranistino); ŝi kantis la psalmon 137 en Esperanto. La kongresanoj ege ĝuis ankaŭ la vesperon kun ercmontara muzikgrupo kaj la skeĉojn, kiujn prezentis partoprenantoj la lastan vesperon.

Por mia edzo kaj mi estis la unua KELI-kongreso, en kiu ni partoprenis. Niaj antaŭaj dubetoj, ĉu ne estas tro longa tempo kongresi tutan semajnon, montriĝis senbazaj. Estis vere ripoziga kaj samtempe instiga semajno por ni.

Sed plej gravis la sperto de vivanta ekumeno: ĉeestis anoj de diversaj Evangeliaj Eklezioj, ĉeestis kelkaj katolikoj, kaj ĉeestis ortodoksaj kristanoj. Kulmino de la ekumena malferma diservo por ni estis la Sankta Manĝo, en kiu ĉiuj partoprenis.

Resume mi ŝatus diri, ke la amikeca etoso inter homoj el diversaj landoj kaj de diversaj konfesioj estas – ne kaŝita – sed videbla trezoro.

Hedwig Fischer

Pieda ekskurso
dum la KELI-kongreso
Foto: Hedwig Fischer



Esperanto iĝos integra parto de Android-telefonoj

La poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj, kiuj uzas la operacian sistemon Android, baldaŭ aŭtomate havos Esperantan klavaron. La klavaro laŭplane estos integra parto de la versio 4.2 de Android, aperonta komence de la jaro 2013. En ĝi Esperanto nun aŭtomate estos videbla en la listo de eniglingvoj.



Male al la operaciaj sistemoj de iPhone kaj iPad, la sistemo Android jam de multaj jaroj permesas facilan tajpadon de Esperanto en ĉiuj programoj. Por uzi tiun eblon, tamen ĝis nun necesas instalii unu el la alternativaj klavaroj, kiuj subtenas Esperanton.

La dana programisto Jacob Nordfalk longe laboris kun la kerna teamo de Android por integri Esperanton en la bazan liston, kaj nun la fina paŝo estas farita. La 31-an de aŭgusto Jean-Baptiste

Queru, la ĉefo de la evoluiga teamo de Android, konfirmis ke la kodo de Esperanta klavaro, havigita de Jacob Nordfalk, eniris la deponejon por la sekva nova versio de Android.

La aranĝo de la nova klavaro havas la literojn Ŝ kaj Ĝ en la loko, kie nacilingvaj klavaroj plej ofte havas la literojn Q kaj W. Ŭ aperas apud U, kaj Ĉ apud C, dum Ĵ troviĝas dekstre de L. Por ricevi la literon Ĥ necesas longe premi H. La mankantaj nacilingvaj literoj same estas atingeblaj per longa premo.

La nun plej freŝa versio de Android, 4.1, estis rivelita fine de junio. Laŭ la plano la enkonstruita Esperanta klavaro estos parto de la sekva nova versio, Android 4.2, kiu supozeble estos publikigita en la komenco de la jaro 2013. Uzantoj de tiu sistemo povos facile enŝalti la Esperantan klavaron, enirante la agordojn pri enig-lingvo, sen bezono instalii ion ajn aldonan.

La baza Android-a sistemo subtenos Esperanton samnivele kiel aliajn lingvojn, kaj Esperanto estos videbla en la listo de lingvoj de la baza sistemo (vidu la ekranbildon).

www.liberafolio.org/2012/android-primalfirma-ol-iphone-ankau-al-esperanto

Esperanto-Wörter im täglichen Leben


Aus dem Englischen sind unzählige Begriffe in die Werbung übernommen worden. Hin und wieder trifft man jedoch auch auf Warennamen, die aus dem Esperanto stammen (oder stammen könnten).

Bei einem Besuch in der österreichischen Stadt Mödling bei Wien entdeckte ich die Werbung von „libro“. Bei näherem Hinsehen stellte ich fest, dass es sich um eine

Einzelhandelskette in Österreich mit über 200 Geschäften handelt, in deren Filialen neben Büchern auch Papier- und Schreibwaren, elektronische Unterhaltungsmedien und Geschenkartikel vertrieben werden.)

Haben Sie schon einmal den Warennamen LUDO in der Werbung gesehen? Das heißt im Esperanto bekanntlich „Spiel“, könnte aber auch von lat. *ludo* – *ich spiele* kommen. Das Unternehmen *jumbo* hat unter dieser Bezeichnung ein Gesellschaftsspiel herausgegeben, das auf dem bekannten „Mensch ärgere dich nicht“ basiert.

Sicher finden Leser von *Esperanto aktuell* noch weitere Beispiele. **Zusammengestellt von Klaus Santozki**



Barbara Pietrzak alvokas por efika informado

Karaj Kolegoj,

Kvankam ankoraŭ freŝaj estas la rememoroj pri la pasintaj feriaj semajnoj kaj Esperanto-aranĝoj, la komenco de septembro signifas rekomencon de laboro kaj aktivado en niaj asocioj, kluboj kaj rondoj. Tiu laboro daŭris ankaŭ en la pasintaj monatoj, aparte lige kun la 125-jariĝo de Esperanto, pasinta la 26-an de julio. En diversaj lokoj estis organizitaj porokazaj eventoj; multaj esperantistoj tiuokaze estis intervjuitaj en publikaj radiaj kaj televidaj programoj. Espereble jarfine eblos legi raporton pri la tutjara esperantista engaĝiĝo.

Eĉ se la tago pasis, la fakto de Esperanto funkcia seninterrompe de pli ol 125 jaroj daŭre estas utiligebla en nia rekomenciĝanta laboro, precipe sur la informa kampo.

En septembro jam tradicie kiel datojn aparte taŭgajn por la ekstera informado ni utiligas kaj rekomendas la Internacian Tagon de Paco (21.09) kaj la Eŭropan Tagon de Lingvoj (26.09). Ambaŭ en 2012 estas festataj la 11-an fojon. En diversaj retlistoj jam eblas legi pri kelkaj entreprenitaj kaj planitaj agadoj. Estas tamen ankoraŭ tempo tiajn agadojn entrepreni en aliaj lokoj, kie laboro nur nun rekomenciĝas.

En la kunteksto de la Internacia Tago de Paco, kies celo estas subteni la ideon de paca kunvivado de popoloj kaj nacioj, estas utiligeblaj kaj reliefigendaj tiuj vortumoj de la Kongresa Rezolucio de la Hanoja UK, en kiuj estis konfirmita la graveco de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco, kaj reciproka respekto, kiu lingvo, t.e.

Esperanto, proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj.

La Eŭropa Tago de Lingvoj la 26-an de septembro estas konceptita kiel tago plialtiganta la konscion de milionoj da eŭropanoj pri la multlingveco kaj multkultureco de Eŭropo, kiel tago instiganta ilin lerni fremdajn lingvojn. La premiso estas, ke ĉiu loĝanto de Eŭropa Unio parolu almenaŭ du fremdajn lingvojn.

Tamen la lingvorealon en EU konsistigas ne sole la ofica lingvoj de la Unio, sed ankaŭ pli ol 60 regionaj kaj minoritataj lingvoj. Samtempe kun la kreskanta nombro de enmigrintoj en Eŭropo aperas ĉiam pli da novaj lingvoj; tiel i.a. en Londono, Parizo, Bruselo kaj Berlino audiĝas eĉ po kelkcent lingvoj ĝis antaŭnelonge en Eŭropo ne uzataj. Tia estas la lingva realo en Eŭropo, en kiu praktike la internacian rolon arogis al si la plej forta nacia lingvo. Do eĉ kono de du-tri fremdaj lingvoj ne certigas egalnivelan, justan interhoman kaj interkulturan komunikadon.

Tiu situacio pravigas nin atentigi pri la 125 jarojn funkcia Esperanto, kiu – kiel vortumas la ĉijara Kongresa Rezolucio – proponas praktikan kaj potencan rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo.

Nia informa porekster agado ne finiĝos en septembro. Jam nun oni notu du laŭvicajn tagojn, taŭgajn por nia interna laboro, sed ja ankaŭ por la ekstera informado: la Ago-Tago (la unua sabato de oktobro) kaj la Zamenhof-Tago (la 15-a de decembro).

Sukcesan kaj efikan informan laboron deziras kun la espero legi multajn raportojn,

Barbara Pietrzak

Ĝenerala Sekretario de UEA,
estranano pri informado

(El Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 470)

Kongresa Rezolucio de la 97-a UK: <http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=466>



En la Centra Oficejo de UEA, dum ĝia Malferma Tago, okazis seminarieto pri informado.

En la filmo, trovebla ĉe <http://www.ipernity.com/doc/uea/7843129>, Mark Fettes prezentas konkludojn el la pli frua diskuto kaj parolas pri la evoluigo de informado pri Esperanto. Poste sekvas diskuto.

Ein Krimi mit Esperanto

Routinegeschichte mit Reklameeinsprengeln

Der Autor Dr. Thorsten Sueße aus Hannover ist Arzt, hat aber erstaunliche Hobbys: Gerade hat er sein Krimi-Erstlingswerk „Toter Lehrer, guter Lehrer“ vorgelegt, und Esperanto lernt er auch. Kein Wunder, dass sich bei dem blutigen Geschehen in seinem Werk finstere und weniger finstere Gestalten original in Esperanto äußern. Es soll ein „Hannover-Krimi“ sein, eine authentische Umgebung, ein wirklich existierendes Gymnasium (nur der Name geändert) und wirkliche Esperanto-Gruppen (bis hin zur Ratkaptista Bando in Hameln) und jede Menge Straßen- und Geschäftsnamen (S. 39), das kann auch ermüden.

Das „dramatische Präsens“, das für das gesamte Buch verwendet wird, wirkt sehr nervig. Der Text gleicht dadurch eher einem Polizei- oder Arztprotokoll. An den richtigen Stellen, wo das dramatische Präsens Spannung erzeugen könnte, hat es damit keine Wirkung mehr, das ist schade.

Eine Reihe von Rückblenden, teils aus der Sicht verschiedener Beteiligten, ist schon besser. Nachdem die Geschichte in der ersten Hälfte nur sehr langsam Fahrt aufnimmt, wird's gegen Ende dann doch spannender, und auch der Stil wird routinierter. Interessant noch, dass die Physik- und Mathematiklehrerin der Englisch- und Französischlehrerin vorhält, mit Esperanto den Schülern überflüssigen Quatsch beizubringen: in der Realität sind die Rollen eher vertauscht.

Zur Intrige, denn das ist doch die Seele eines Krimis: Gibt es die Möglichkeit, spannend mitzuraten, wie und warum sich alles so abgespielt hat? Gibt es überraschende Wendungen, wird der Leser mit listigen Hinweisen in die Irre geführt? Ist die Lösung am Ende überzeugend? – Nun ja, es kommen realistisch biedere Lehrer und Polizisten vor, da kann es nicht viele ungeahnte Abgründe geben. Der routinierte Krimileser kann so auch etwa ab Mitte



des Buches unschwer Täter und Motive erraten, aber eine Überraschung gibt es auch. Es spricht für den Autor, dass er selbst einige Dutzend Seiten weiter das Geheimnis lüftet und die Geschichte aus einer anderen Perspektive weitererzählt. Damit werden einem langatmige Erklärungen erspart, was der Spannung zugute kommt. Insgesamt ein durchschnittlicher Krimi mit Reklame für Esperanto, Taekwondo und Hannover.

Rudolf Fischer

Sueße, Thorsten: Toter Lehrer, guter Lehrer. Taschenbuch. Verlag CW Niemeyer. Hameln 2012. 440 Seiten. 12,5 x 19 cm. 398 g. Preis: 9,95 €. ISBN 978-3-8271-9454-1

Universitato de Brazilo ekinstruas Esperanton

Esperanto oficiale eniris en la kursaron de Universitato de Brazilo (UnB). La Internacia Lingvo alkalkulas sin al la nombro de la 12 aliaj idiomoj instruataj en tiu institucio. La ĉefa celo estas la preparado de instruistoj. La lecionoj okazos en la Campus Asa Norte, du fojojn semajne, sub la kunordigo de Paulo Nascentes kaj Jozias Barboza.

SAT-aranĝo pridiskutas naciismon kaj tutmondiĝon

Aŭguste okazis la 85-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT). La temo estis kontraŭdiro inter kresko de naciismo kaj tutmondiĝo. La aktivajoj havis lokon en Jalto, suda regiono de Ukrainio. La programo konsistis el prelegoj, debatoj kaj ekskursoj, krom teatra, kina, kanta kaj danca prezentadoj.

(www.satesperanto.org)

Facila Vento: Tekstoj en stilo simpla por lernantoj

Daŭre funkcias glate la paĝaro Facila Vento. La iniciato celas liveri al lernantoj tekstojn en simpla stilo, kun fundamenta vortprovizo. Laŭ la kunordiganto de tiu projekto, la brazila instruisto Emilio Cid, la lernantoj pligrandigas sian intereson, kiam ili konstatas, ke ili sukcesas legi kun pli da lerteco ne bezonante konstante konsulti la vortaron. Cid fine asertis, ke novaj esperantistoj ekfidis sin, iom post iom plialtigante la nivelon de la legaĵoj.

(<http://facila.org>)

Eŭropa Esperanto-Unio organizis kongreson en Irlando

Julie okazis la Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) sub la aŭspicio de la Irlanda ŝtatprezidanto Michael D. Higgins. La aranĝo havis lokon

en Galivo. Proksimume 160 homoj el 28 landoj, ĉefe Eŭropaj, sed ankaŭ venis gastoj el Kubo, Brazilo, Japanio kaj Usono. Oni kunsidis pri juro, ĵurnalismo, edukado kaj literaturo. La kultura parto konsistis el muzika, danca kaj teatra prezentadoj. Koncertis la muzikistoj Georgo Handzlik kaj JoMo. La venonta kongreso okazos en Julio 2014 en Nitra (Slovakio). (www.europano.eu)

Google kaj la Kanada kompanio Cirque du Soleil: „Movi. Kanti. Revo.“

La informadika firmao Google kaj la Kanada kompanio Cirque du Soleil lanĉis projekton kies nomo estas en Esperanto. Ties titolo estas Movi. Kanti. Revo. Temas pri sensora eksperimento, kiu esploras novan formon por navigi en la komputila mondo. La prezentado taŭgas por elmontri la novan tridimensian teknikon de la interreta navigilo Google Chrome. La spektantoj sekvas misteran gastigantaron kaj uzas gestojn kaj sonojn por navigi en la etoso kreita de la cirka trupo.

(ekz.: www.youtube.com/watch?v=p-bAgz5kiL4)

OSIEK-premio al Ertl por traduko de „Sensorteco“

La ĉi-jara OSIEK-premio, kiu valoras 700 Eŭrojn, estis prijuĝita al István Ertl, pro lia Esperanta traduko de „Sensorteco“, la ĉefverko de la nobelpremiita Hungara verkisto Imre Kertész. OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) ĉiujare atribuas la premion pro „kultura kreaĵo nefikcia“. En 2009 la premion ricevis Spomenka Štimec pro sia „Kroata milita noktlibro“. En 2010 kaj 2011 estis premiitaj tradukoj el la islanda kaj ĉina literaturoj, de Baldur Ragnarsson kaj Laŭlum. (www.liberafolio.org)

(<http://osiek.org/iek/index.php>)

ILEI-konferenco en Ĉinio kun altranguloj

La 45-a konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis solene malfermita en Kunming en sudokcidenta Ĉinio, Sabate la 21-an de Julio. La inaŭguron ĉestis senprecedenca kvanto de altrangaj oficialuloj. La konferenco okazas en la Profesia Artkolegio de Kunming kaj daŭras ĝis la 26-a de julio. Interalie estis elektita nova estraro.

(www.ilei.info)

UEA en UN-kunsido pri indiĝenaj popoloj

Julie okazis ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo la 5-a sesio de la fakula kunsido traktanta la tutmondan situacion koncerne rajtojn de indiĝenoj, „Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP)“. Reprezentantoj de UEA Verena Graf, Cesco Reale kaj Stefano Keller partoprenis la eventon, kiun ĉestis delegitoj de indiĝenaj popoloj el ĉiu kontinento kaj membroj de NRO-oj defendantaj indiĝenojn. La rezultoj de la EMRIP-kunsido, kiu okazas unufoje ĉiujare, estos plutraktataj de la Homrajta Konsilio de UN.

(www.uea.org)

Fettes ebla sekva prezidanto de UEA

La elekta komisiono de Universala Esperanto Asocio opinias ke Mark Fettes estus taŭga kandidato por la posteno de prezidanto en la elekto okazonta post unu jaro en Rejkaviko. Lia nomo estas la sola, kiun la elekta komisiono mencias en sia raporto, sendita al la komitatanoj de UEA sojle al la Universala Kongreso en Hanojo, malfermita la 28-an de Julio. En intervjuo de Libera Folio Mark Fettes rakontis, ke li interesiĝas pri la propono. Tamen lia eventuala fina konsento dependas de tio, kian estraran teamon li gvidus. „Mi serĉas homojn,

kiuj montris sian kapablon kunlabori 'kun longa spiro' kaj kiuj kredas je la neceso kaj ebleco de fundamentaj ŝanĝoj en UEA, tamen kun respekto al ĝia karaktero kaj tradicioj", li inter alie diras. (www.liberafolio.org)

Nova aprobita Comenius-projekto

La projekto kun la titolo „Vizito de la loka kastelo al la Eŭropa domo - A Guided Tour from the Local Castle to the European House“ ricevis aprobon. Ĝi daŭros dum 2 jaroj inter 2012-2014 inter mezlernejoj en Herzberg am Harz en Germanio, Győr en Hungario kaj Mazaradelvalo en Italio. Kiel 4-a partnero povos aldoniĝi lernejo el Zagreb, kiu estas momente en atendolisto. La projekto estas formulita de Zsafia Korody kaj Ewa Kukielka el Herzberg.

(Zsafia Korody,
Interkultura Centro Herzberg)

Informo pri Esperanto en Vienaj metroo-stacioj

„Infoscreen“ estas sistemo kiu per grandaj ekranoj en metroo-stacioj montras video-programon kun novaĵoj, kulturaj informoj, veter-prognozoj kaj varbado. En Julio videblis informo kun tiu ĉi germanlingva enhavo: 1-a bildo kun la jubilea simbolo kaj „125 jaroj de Esperanto – Saluton“; 2-a bildo kun foto de Zamenhof kaj la teksto „Tiel oni salutas en la pont-lingvo kreita de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ĝi interligigas homojn de ĉiuj patrinaj lingvoj. Ankau en Vieno ekzistas Esperanto-asocio“.

(Yahoo-grupo aŭstraj esperantistoj)

Nova ESF-filio mastrumos la retejon Lernu kaj aliajn retajn projektojn

Esperantic Studies Foundation (ESF) fondas filion por mastrumi la daŭran disvolvado de projektoj kiel lernu.net, la bone konata multlingva retejo

por lerni Esperanton. En Montrealo, Kanado, dum sia jara strategia sesio, la ESF-estraro nomumis Erin Piatieski kiel fandan ĝeneralan direktoron de la nova kompanio ESF-enrete. „Nia celo estas igi la diversajn retprojektojn finance memstaraj, kaj samtempe certigi ke tiuj projektoj ne ekdominos la tutan prioritataron de la Fondaĵo“, diris ESF-prezidanto Mark Fettes. Subtenantoj povas donaci al la kampanjo „100 000 eŭroj por ESF“ <http://kampanjo.ikso.net/eo/>. (www.esperantic.org)

Asocio Germana Lingvo pri Esperanto

En sia informa retletero la asocio raportis pri Esperanto, ties historio kaj citas la Britan programiston Gavan Fantom, kiu diras, ke Esperanto alportas diversecon en la vivon kaj kunligas homojn; cetere li opinias, ke estas problemece aprobi la Anglan kiel mondvastan, universalan lingvon, ĉar ĝi estas politika lingvo kaj denaskuloj havas privilegion kontraŭ la ne-denaskularo.

(www.maerkischeallgemeine.de)

Nova senpaga e-libro „Maigret hezitas“ de Georges Simenon

En la retejo de Sezonoj/La Ondo de Esperanto ĵus aperis la romano „Maigret hezitas“, tradukita en Esperanton de Daniel Luez kaj eldonita de „Sezonoj“ en 1999. „Maigret hezitas“ estas la 11-a ero en la serio „Virtuala Biblioteko de Sezonoj“. Ĝi kaj 13 pliaj e-libroj de „Sezonoj“ estas senpage elŝuteblaj en la prezentomanieroj (formatoj, dosierformoj) pdf kaj epub.

(<http://sezonoj.ru/2012/07/maigret/>)

Du novaj Honoraj Membroj de UEA

En la inaŭguro de la 97-a UK en Hanojo estis anoncita la decido de la Komitato de UEA pri la elekto de Hori Jasuo el Japanio kaj Georgo Nanovszky el Hungario kiel Honoraj Membroj de UEA. Legu pli: <http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/>

gk.php?no=463#l

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Novaj-retejo

NOVAĴOJ estas aktuala novaĵejo en Esperanto, kie oni povas trovi ĉiutagajn informojn de la plej elstaraj novaĵ-agentejoj en Esperantio, kiel Ĉina Radio Internacia, Monato: la Internacia Magazino Sendependa, Muzaiko - la retejo de Neniam Milito Inter Ni, Eŭropa Civitano, Le Monde diplomatique en Esperanto, k.t.p. NOVAĴOJ ankaŭ prezentas raportojn de video-ĵurnalistoj Maximiliano Catania, Fábio Monteiro kaj Wilson Foo.

(<http://novajhoj.weebly.com/index.html>)

Harry Harrison forpasis

La renoma verkisto Harry Harrison forpasis la 15-an de aŭgusto en Crowborough (Anglio). Li naskiĝis la 12-an de Marto 1925 en Stamford (Usono). Harrison lernis Esperanton en sia junaĝo kaj estis membro de UEA jam ekde 1945. En 1985 li estis elektita al la Honora Patrona Komitato de UEA. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Esperanto-Asocio de Irlando kaj honora membro de la Usona landa asocio Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (nun Esperanto-USA). Harrison famiĝis pro siaj sciencfikciaj romanoj, en kiuj ofte aperas mencioj pri Esperanto kiel lingvo de la estonta mondo kaj ankaŭ specimenaĵoj tekstoj en Esperanto, kvankam ne ĉiam en ortodoksa formo. La plej fama parto de lia verkaro estas la serio pri la „Rustimuna Ŝtalrato“. Unu libro de la serio, La naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato, aperis en Esperanta traduko en 1996 ĉe Sezonoj kaj estas nun senpage elŝutebla. En 2001 Impeto eldonis tradukon de lia romano *La kaptita universo*, kiu, voĉlegita de la tradukinto Andrej Grigorjevskij, en 2004 aperis ankaŭ sur kompakta disko. (Gazetaraj Komunikoj de UEA) (<http://esperanto.org/Ondo/Libro/Libro.php>)

Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

Aktuelles, Wissens- und Bedenkenwertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 7: Bunte Zeitschriften- Vielfalt – Teil 2, parto dua – la bunteco de niaj periodaĵoj

Die vorige Folge 6 bescherte uns einen Ausflug in die bunte Welt der Zeitschriften – sowohl in Esperantujo, aber auch mit einem Blick über den Tellerrand in die Welt der anderen Plansprachen. Angekündigt war ja schon, dass das nur der Anfang einer Aufzählung sein konnte. Von den Lesern ging dazu keine Kritik ein, also soll hier eine Fortsetzung folgen (der Umfang der Liste wird begrenzt durch den verfügbaren Platz im Heft):

Unternehmen wir also erneut eine faszinierende Reise durch die bunte Welt der Plansprachen, insbesondere des Esperanto und der Zeitschriften, gerade auch der, die schon lange nicht mehr ausschließlich auf Papier erscheinen!

Zur Zeit erstehen viele neu, doch manche verabschieden sich nach kurzer oder längerer Zeit wieder und verschwinden in der Versenkung – mit etwas Glück und den richtigen Suchbegriffen kann man dann doch noch Teile davon ausgraben, auch mit Hilfe des Internet-Webarchivs, das viele Leser vielleicht noch gar nicht kennen.

Geradezu prädestiniert ist ja das weltweite Netz, um sich auch mal in exotisch-fernen Regionen umzusehen – was aber nicht heißen soll, dass es in der allernächsten Umgebung nicht auch Interessantes zu entdecken und bewahren gäbe!

Ein letzter Hinweis noch vorab: unsere Auflistung bedeutet, dass wir dort Neuzugänge hatten, nicht aber, dass dies immer die allerneuesten Hefte sind und dass die betreffende Zeitschrift noch existiert; wir erwerben auf diesem Wege auch Stücke, die im Altbestand der Sammlung bislang fehlten.

A.E.A.-informilo, organo de Astura Esperanto-Asocio, Gijón, erscheint seit mehr als 6 Jahren.

Ateismo, bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo, seit 1988.

BEL informas, informilo de Liga Brasileira de Esperanto, 2007-2010.

Beograda Verda Stelo, organo de Esperanto-societo Beogrado, seit 2006; nach jahrzehntelanger Stille eine neue serbische Zeitschrift, inzwischen bereits im 7. Erscheinungsjahr.

Cirkulero (später: Dialogo), organo de Sarlanda Esperanto-Ligo, 1973-1988; danach als Beilage zu „La Gazeto“ bis 1996.

Cirkulero de Midi-Pyrénées, petite lettre ... de fédération des

espérantistes de ..., Toulouse, 2008-2011.

EAB-Update = Ĉisdate / EAB, kvaronjara organo de Esperanto-Asocio de Britio, seit 1998.

EeD, Esperanto en Danio, membroorgano de Dana Esperanto-Asocio, Kastrup, erscheint im 19. Jahr.

Esperanto Mormonaro (EM), ĵurnalo pri Esperanto kaj Mormonismo, de PEM, Por-Esperanta Mormonaro, Las Vegas; renaskiĝo de PEM en 2011 post pli ol 10-jara aktiveco en 1980-1991.

Esperanto aktuala, informilo dumonata de Esperantista Brusela Grupo, seit 1977 oder früher.

Esperanto en Afriko, bulteno de la Afrika Komisiono de UEA, Lokossa-Mono, Benin, seit 2006.

Esperanto en Ĉuvaŝio, monata gazeto de la Esperant-lingva komunumo de la Ĉuvaŝa Respubliko; red. fondinta: Aleksandr Blinov, 2009.

Eŭropa bulteno, oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio, Bruselo, seit 2004 oder früher.

Gazeto Andaluzia, Esperanta Monata Revuo, organo de grupoj fonditaj en la Kadiza regiono, San Fernando (Cadiz) 1910 – wurde fortgesetzt als.

Gazeto Hispana, Esperanta Monata Revuo, oficiala organo de Hispana Societo p. p. Esperanto kaj de la aliĝintaj grupoj, Cadiz, 1911 – nach langer Pause (sicher mitbedingt durch den Bürgerkrieg) wieder neu erschienen unter dem ursprünglichen Titel:

Gazeto Andaluzia, revuo de la Andaluzaj grupoj de Esperanto, Sevilla, Cordoba, Málaga, ab 1984.

Ĝenerala informilo de BEC, Barcelona Esperanto-Centro, zeitweise auch unter anderen Titeln wie Informació ...

HACE, Horizonte de Afrika Centro Esperantista, liberesprima informilo de Afrika Centro Esperantista, red.: Cophie Parphes, Lome, Togolando.

Ido-Saluto! revuo dal Ido-amiki Berlin, edidita dal Germana Ido-Societo, Berlin, Ido-Amiki Berlin, seit 2006.

Informilo (poste: koktelo de Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko, 2011.

Informletero de Vinilkosmo, pri aktualaj esperanto-muzikoj de Floréal Martorell, seit 2003.

InKo, informilo de KKE - Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro; nova fazo ek de 2008.

iompostiom = ipigazeto, internacia reta printebla gazeteto, kompostita el retaj fontoj, por sur la tablo en esperantaj kluboj de Joop Kieft (=LaPingvino); 15 Nummern in 2007.

Jen, Jongeren Esperanto Nieuws, perioda revuo, Amsterdam, seit 1975.

Juna alumeto, bulteno de Junulara Komisiono de KEA, Kanado 1994-1999.

komACE, komunikoj de Afrika centro Esperantista, Lome, Togolando, seit 2006.

Komunikoj, *erscheint bereits im 37. Jahr* in der Editora Lorenz, spiritisma eldona asocio Lorenz, Rio de Janeiro.

La Krokodil!, informbulteno de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo, seit 2000 (und vorher).

Kvaronjara bulteno de AAIE, Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, Santa Barbara CA, seit bereits 188 Quartalen.

Litova Stelo, oficiala organo de Litova Esperanto-Asocio, nach fast 100 Jahren Erscheinen in 2011 eingestellt (hoffentlich nur ein Dornröschenschlaf wie in der Periode 1940-1990?).

Monate ĉe vi, organo de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Monda solidareco, informilo (auch: bulteno) de Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato, St-Aubin-de-Luigne, seit 1983.

Nia Bulteno, informa bulteno de Portugala E-asocio, Lisboa, seit 1975.

Nia voĉo, organo de Madrida Esperanto-liceo, zur Zeit redigiert von Toño del Barrio.

Nordhungaria Informo, Informilo de „Király Lajos“ Esperanto-Amika Rondo, Miskolc, seit 2005

Nova provo, organo de NOVO, asocio por komuna ellaborado de lingvo internacia, Experimentalzeitschrift 1991-1997.

Pajame Sabz-andišan (=Mesaĝo de Verdpensuloj), später: Irana Esperantisto, kultura sezon-revuo en la persa kaj Esperanto.

Penseo, monata beletra revueto en Esperanto, fondita en 1990, enretigita in 1997, Chongqing

Popola fronto, informa bulteno internacia pri hispana lukto kontraŭ la faŝismo, eldono de grupo laborista esperantista Valencia - aus der Zeit des spanischen Bürgerkriegs, 1936-1938.

Progreso, oficiala organo di la Unio por la lingvo internacia Ido, fondesis da Louis Couturat in 1908.

RECIM-Info, bulteno de Registrolibro de la Civitanoj de la Mondo, Paris, seit 2004.

RECIM-Mondo, interna bulteno de Registrolibro de la Mondcivitanoj kaj de la tutmondiĝintaj komunumoj, Paris, seit 2004.

REGO, Rusia Esperanto-Gazeto, komuna eldono de REUM kaj REJM, Moskvo, seit 2000.

La SAGO, la Sat-Amikara GazetO, Paris, seit 2003.

Saluton! Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, Chicago, seit 2006.

Saluton! Ligilo de Kantabra Esperantistaro – organo de Asociación Cántabra de Esperanto. Santander 2002.

SATeH-informilo, informilo de Asociación Izquierda y Esperanto SATeH, SAT en Hispanio, Madrid, seit 2003.

Sekso kaj egaleco, sendependa novaĵletero Anna Brennan - erschien in den Jahren 1979-1988 - Anna ist heute bekannter als Anna Löwenstein.

Sudfranca Stelo, bulteno de la Esperanto-Federacio „Languedoc-Roussillon“, Perpignan, seit 1951.

La Suno Hispana, oficiala organo de HSPE, seit Oktober 1903.

Usona Esperantisto, dumonata bulteno de Esperanto-USA, Rochester, erscheint seit 1965, anfangs als „esperanto USA“.

Der VDS-Infobrief (Presseschau) des Vereins Deutsche Sprache erscheint wöchentlich.

Monatlich erscheint dazu auch das **VDS-Tagebuch**.

Verda mesaĝo el Vjetnamio, bulteno de VEA, Vjetnama Esperanto-Asocio.

Utho Maier

Deputitino de Federacia Parlamento vizitis la Germanan Esperanto-Centron



Je komenco de julio 2012 vizitis nin la juna deputitino Viola von Cramon kun granda delegacio de verdaj politikistoj el la regiono. Ŝi petis informojn pri Esperanto kaj pri la multflankaj laboroj kaj taskoj de la Interkultura Centro Herzberg.

Ŝpite de forta pluvado okazis vigla ĝardenfesto. Ludis la nova muzikgrupo Senlime el Bad Lauterberg, eĉ kelkajn titolojn en Esperanto. Estis gajaj horoj kun speciala etoso. La deputitino de la federacia parlamento ankaŭ plenumas la gravan funkcion kiel parolantino por la Eŭropa Unio de la federacia parlamento

GEA-estrarano Sebastian Kirf informis Viola von Cramon pri Esperanto kaj daŭrepoveco.

Al regiona ĵurnalistino ŝi diris, ke „la Esperanto-Centro estas diamanto por la tuta regiono Südharz“.

Germana Esperanto-Asocio ricevis danke jenajn revuojn:



Bulgara Esperantisto (2012/3), *Dia Regno* (2012/4), *Dio Benu* (IKUE/ĈEA, 2012/3), *Esperanto en Danio* (2012/3, 4), *FEN-X* (2012/5), *IPR* (2012/3), *La Espero* (2012/4), *La Informilo* (158, 2012 sep), *L'esperanto* (2012/3), *Kataluna Esperantisto* (2012 jun), *Kontakto* (2012/3), *La Lanterno Azia* (2012/7, 8 + 9), *La Ondo de Esperanto* (2012/8 + 9, 10), *La Revuo Orienta* (7, 8 + 9, 10), *Norvega Esperantisto* (2012/4), *Novaĵoj Tamtamas* (273, 274), revuo *Esperanto* (2012/9), *Sennaciulo* (2012 /5 + 6, 7 + 8), *SES informas* (2012/3), *Starto* (2012/3), *Usona Esperantisto* (2012/4).

Internaciaj Esperanto-kursoj en Herzberg – la Esperanto-urbo

En julio 2012 okazis la unuan fojon Esperanto-lingvokursoj en blokoj dum du semajnoj en Herzberg kaj por junuloj kaj por plenkreskuloj.

Tio estis kvazaŭ testo por la estonto kaj taŭga kontribuo al la 125-jara jubileo de Esperanto. Jam en la sepdekaj ĝis la naŭdekaj jaroj okazis multaj regulaj Esperanto-lingvokursoj en Herzberg kun multaj partoprenintoj (por komencantoj ĝis parolantoj). Danke al tio Herzberg jam antaŭ jardekoj estis grava loko i.a. por Esperanto-instruado.

En Herzberg (meze en Germanio ĉe la mezmontaro Harz kaj nacia parko Harz) troviĝas ideala ebleco kombini kulturon, Esperanton kaj turismon. La regiono troviĝas en centra parto de Germanio kaj per trajno kaj per aŭto ĝi estas bone atingebla. Pro la fakto, ke ekde ĉ. 1999 troviĝas konstanta Esperanto-klerigejo ĉe Esperanto-Societo-Südharz kaj nun ĉe la oficiala Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo. Konstante la fakklerigejo de GEA zorgas ankaŭ pri faka, metodika pluklerigado ofertante seminariojn kaj fakkunvenojn. Unu aktuala ekzemplo estas la tradukseminario rilate al la „Nacia Parko Harz“.

Ekzemple ĉe Germana Esperanto-Centro troviĝas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj kun granda fakarkivo. Specialaĵo estas la ĉ. 400 apartigitaj libroj en la pedagogia fakarkivo, kiuj estas je dispono surloke aŭ pruntepreneblaj kiel lernmaterialoj kaj didaktikaj helpiloj.

Zsófia Kóródy (GEA-komisiitino por instruado/prezidanto de AGEI) kaj Peter Zilvar (GEA-komisiito por Klerigado kaj Kulturo) ekde longa tempo konstante plenumas la klerigtaskojn. La GEA-filio ofertas specialan klerigprogramon kun la studadceloj „Esperanto-instruisto“, „Esperanto-fakulo“ kaj „Esperanto-kursestro“.

Multaj jam uzis tiun ĉi unikan klerigvojon de la GEA-Filio. Interesatoj povas peti specialan informilon pri klerigado ĉe: esperanto-zentrum@web.de

Ankaŭ regulaj lingvokursoj (semajnfinaj kursoj) apartenas al la ofertoprogramo.

Dum julio 2013 ni denove ofertos dum du semajnoj lingvokursojn por komencantoj ĝis parolantoj (ne nur el Germanio kaj Eŭropo, sed eĉ el foraj landoj). Antaŭtagmeze okazos celkonscia lernado kaj posttagmeze travivaĵoj kaj ekskursoj. Vespere okazos programoj en la Interkultura Centro Herzberg (ICH). En Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo ni kreis unikan Esperanto-infrastrukturon por multaj Esperanto-aktivecoj, sed tio estos aparta temo.



Inaŭguro de la nova ekspozicio „Esperanto 125-jara“

La 26an de julio 2012 okazis la inaŭguro de la speciala ekspozicio okaze de la 125-jara jubileo de la ekesto de Esperanto. Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg iniciatis organizi ĝin el la diversaj historiaj materialoj de la ICH-biblioteko. Pri la selektado de la ekspozicimaterialoj el la diversaj epokoj de la 125-jara historio zorgis ĉi-foje Andreas Diemel kaj Matthias Reimann. Temas jam pri la kvina specialtema ekspozicio en la Esperanto-ĉambro de la muzeo en la Welf-kastelo en Herzberg.

En 3 montrofenestroj troviĝas informtekstoj en skiza formo pri la historio de Esperanto. En la vitrinjoj oni povas trovi fruajn bildkartojn kaj fotojn, ekz. kun la familio Zamenhof kaj la reprintaĵojn de la Unua Libro. Aldoniĝis interesaj literaturaj verkoj, gazetoj, varbiloj el la diversaj epokoj. Leteroj, filatelaĵoj kaj kelkaj raraj esperantaĵoj el la unuopaj jardekoj plenigas du vitroŝrankojn. Ofte la historiaj materialoj estas en kontrasto kun nuntempaj verkoj, lernolibroj, vortaroj por montri ankaŭ la aktualan uzeblon de la lingvo.

Urbestro Gerhard Walter mem ĉeestis en la inaŭguro pro la jubilea tago. Li ĝojis vidi novajn kaj malnovajn vizaĝojn en la Esperanto-urbo kaj dankis por la preparo de la nova alloga Esperanto-ekspozicio.

Tri estraranoj de GEA, nome Andreas Diemel, Sebastian Kirf kaj Christof Krick kaj tri estraranoj de EGS, nome Zsofia Korody, Matthias Reimann kaj Petro Zilvar kaj



nemalmultaj gastoj ĉeestis la inaŭguran ceremonion.

Ĉie en la urbo ni varbas per grandaj afiŝoj por la nova ekspozicio. Ĝi restos ankoraŭ ĝis novembro 2012. Certe miloj da muzeovizitantoj ricevas taŭgajn informojn pri Esperanto dank' al tiu jubilea ekspozicio kaj povas kunporti hejmen la tie troveblajn Esperanto-informilojn kaj -varbilojn.



Kalendaro

Oktobro 2012

19-21: Semajnfinaj kursoj laŭ diversaj gradoj (A1-C1) en Herzberg/Harz, Germanio. Inf.: Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro, DE-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Tel: +49-(0)5521-5983, rete: <http://esperanto-urbo.de>, esperanto-zentrum@web.de

19-21: KEKSO - Kreativa Esperanto-Kurso en Potsdam, Germanio. KEKSO estas eta Esperanto-aranĝo por junaj germanoj, kiu volas ricevi unuajn spertojn en Esperantio. Tamen kompreneble eksterlandaj gastoj estas ĉiam bonvenaj. La partopreno por eksterlandanoj estas senkosta. Inf.: Germana Esperanto-Junularo, jarno.riefer@esperanto.de

19-21: 66-a Kultura Semajnfino de SEL en Homburg/Saar en Germanio. Enkonduka kaj progresiga Esperanto-kursoj - prelegoj de Kreshimir Barkovitch, Parizo - libroservo kaj diservo - internacia vespero - prelegoj pri Islando - ekskursoj al Blieskastel kaj Saarbrücken. Inf.: Sarlanda Esperanto-Ligo r.a., Alter Hangarten 2, DE-66440 Blieskastel, Germanio. Rete: selestraro@esperanto-reto.eu

25-29: Praktikado de la lingvo per Tinĉjo-bildstrio kun Michel Dechy en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. Rete: informoj@kvinpetalo.org

26: 2-a Esperanto-Konferenco en Alikanto, Hispanio. Ĝuu someron aŭtune en mediteranea urbo. Esperanto, kulturo, librobazaro, feriado. Inf.: drfjd@web.de

27. okt - 03. nov: AŬTUNE 2012 en Greziljono, Baugé, Francio. Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj - kun kursoj, muzikado, ludoj kaj aliaj aktivaj laŭ via elekto. Specialaj gastoj: Svetlana Smetanina el Moskvo kaj Kees Ruig el Nederlando. Inf.: Esperanto-kastelo Greziljono, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, Francio. Rete: www.gresillon.org/autune, kastelo@gresillon.org

Novembro 2012

02-04: Provludo de Interkant' pri Karmen' en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Inf.:

Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. Rete: informoj@kvinpetalo.org

02-04: Klaĉkunveno PostSomera, KKPS en Delft, Nederlando. Okazos renovigita versio de la PostSomera Klaĉkunveno. Internacia organiza teamo bonvenigos vin en Delft (NL). Estos prelegoj, ludoj, ekskursoj, muziko, kaj ĉefe...klaĉoj! Inf.: Nederlanda Esperanto-Junularo, Oosterstraat 65, NL-2611TV Delft, Nederlando. Rete: kkps2012@googlegroups.com

03-04: 9-a Rata Rendevuo en Hameln + Fuhlen, Germanio, por festi 25 jarojn de Ratkaptista Bando, kun koncerto de „Kapriol!“: Ĉiĉeronado tra la malnova urbocentro de la Ratkaptista urbo Hameln, la renovigita muzeo kun vizito de la nova mekanika ratkaptista teatraĵo, komuna vespermanĝo. Fuhlen estas premiita en la landa konkurso de Malsupra Saksio por apartaj sukcesoj. Inf.: La Ratkaptista Bando, Schmiedeecke 2, DE-31840 Hessisch Oldendorf, Germanio. Rete: hameln@esperanto.de

08-11: 1-a Internacia Esperanta Lernejo en kastelo Bartošovice, Ĉeĥio. Studado de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj, koncerto de Anjo Amika en la kastelo, Fiŝkaptista Festivalo. Inf.: radio Verda Stacio verdastacio@gmail.com

09 - 11: Gliwicea rendevuo GRUPE 16 en Gliwice, Pollando. Inf.: Pola Esperanto-Asocio - Filio en Gliwice, staman@ka.onet.pl

10: Esperanto-renkonto en Vác, Hungario, kadre de Aŭtunaj Artaj Semajnoj. Celebro de memorfesto de naskiĝo kaj morto de János Sárközi (1932-2007) ekde la 17-a horo en la Kulturcentro „Imre Madách“ en Vác

15-18: KAEST - Konferenco pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko en Modra Harmónia, Slovakio. La ĉeftemo de la konferenco: Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj. Inf.: kaest@ikso.net

15-18: Semajnfinaj kursoj laŭ diversaj gradoj (A1-C1) en Herzberg, Germanio. Inf.: Germana Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Germanio. Tel: +49-(0)5521-5983, rete: esperanto-zentrum@web.de

24: 37-a Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando. Prelegoj, libroprezentadoj, filmoj. Inf.: Universala

Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Rete: uea@co.uea.org

Decembro 2012

07-09: 13-aj Bjalistokaj Zamenhof-tagoj en Bjalystok, Pollando. Prelegoj, konkursoj, koncertoj, teatraĵoj, ekskursoj tra la urbo kaj laŭ „la reĝa vojo“ en la regiono podlaĥia, tradiciaj noktaj renkontiĝoj de geamikoj en la esperanto-klubejo Inf.: Bjalistoka Esperanto Societo, PL-15-282 Bjalystok, str. Piękna 3, Pollando. Rete: esperanto.bialystok@interia.pl

14-16: 57-a Studmodulo kun Zamenhof-festo (15.12. vespere) en Esperanto-Centro Herzberg/Harz, Germanio. Inf.: (Vidu 19 okt.)

27. dec - 03. jan: 29-a Internacia Festivalo en Dortmund, Germanio, en moderna domo urbocentre sed en trankvila ĉirkaŭo. Kadra temo: Komputilo kaj interreto. Tuttaga ekskurso tra la Ruhr-regiono, kun vizitoj al urboj Bochum, Essen kaj Oberhausen. Plilongiga eblo ĝis 4-a de januaro. Inf.: Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel./fakso +49-5624-8007, portebela +49-171-4964558, Rete: www.internacia-festivalo.de, [HDP\(ĉe\)internacia-festivalo.de](mailto:HDP(ĉe)internacia-festivalo.de)

27 dec - 03 jan: 11-a Novjara Renkontiĝo (NR) en Xanten (okcidente de Essen/Ruhr), Germanio. Por infanoj, familioj kaj aliaj plenkreskuloj. Ĉ. 150 partoprenantoj el deko da landoj. Prelegoj, koncerto, teatraĵo, ekskursoj. Lingvokursoj por komencantoj, konsacio - kaj bela internacia etoso Inf.: EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. Rete: www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr, lu.esperantoland@gmx.de

27dec-03jan: 4-a Novjara Internacia Semajno (NIS) en Xanten (okcidente de Essen/Ruhr), Germanio. Renkontiĝo por junuloj kaj junaj plenkreskuloj, apud Nederlando kaj Belgio. Junularaj programoj, diskoteko, ekskursoj, lingvokursoj. Paralele al la 10-a NR Inf.: (Vidu supre)

28 dec - 02 jan: SANO 3 - La alternativa jarŝanĝa seminario en Herzberg/Sieber, Germanio. Inf.: (Vidu 19 okt.)

28 dec - 04 jan: 4-a Junulara E-Semajno en Naumburg (Saale), Germanio. Inf.: Junulara Semajno. Inf.: www.jes.pej.pl, jes@pej.pl

Somera Esperanto-Kunveno





Saluton, liebe Leser

Es scheint, als hätte unsere letzte Ausgabe tatsächlich ein paar Reaktionen hervorgerufen, die wir euch natürlich nicht vorenthalten wollen, ebensowenig wie Ort und Zeit der diesjährigen Jahreshauptversammlung. Welche übrigens im Rahmen des JES stattfindet, zu dem wir euch gleich mit einladen wollen.

Ansonsten hoffen wir, dass ihr euren (Esperanto-) Sommer gut überstanden habt und der einbrechende

Herbst mit wiederbeginnender Schule oder Studium oder Arbeit euch nicht allzu hart trifft.

Wie immer freuen wir uns, von euch kontaktiert zu werden mit Kommentaren, Kritik oder Artikeln – traut euch und schreibt an kune@esperanto.de


Ĝis,

Caroline und Miriam



Liebe Mitglieder der Deutschen Esperanto-Jugend e.V.,

Wir, euer Bundesvorstand, laden euch hiermit ganz herzlich zur diesjährigen Jahreshauptversammlung ein. Sie wird am 31. Dezember 2012 um 14 Uhr in der Jugendherberge in Naumburg stattfinden. Auf der Tagesordnung stehen unter anderem folgende Punkte: Vorstellung des Jahresberichts 2012 und des Kassenberichtes 2012, Entlastung des Vorstandes, Satzungsänderungen (siehe unten). Kommt zahlreich, es gibt auch was zu knabbern.



**Adresse/Adreso:
Jugendherberge Naumburg
Am Tennisplatz 9
06618 Naumburg/Saale**

Der Bundesvorstand schlägt folgende Satzungsänderungen für die Hauptversammlung zur Diskussion vor:

§ 1 Name und Sitz

aktuell: [...] Die DEJ ist im Vereinsregister mit dem Sitz in **Bonn** eingetragen.

Änderungsvorschlag: [...] Die DEJ ist im Vereinsregister mit dem Sitz in **Berlin** eingetragen.

§ 7 – Der Bundesvorstand

aktuell: Der Bundesvorsitzende ist Bundesvorstand im Sinne von § 26 BGB.

Änderungsvorschlag: Bundesvorsitzender **und Stellvertreter sind je einzelvertretungsberechtigt als** Vorstand im Sinne von § 26 BGB. **Sie regeln untereinander die Wahrnehmung der Vertretungsbefugnis.**

Kommentar

Wollen wir die Krise überwinden, müssen wir uns tatsächlich zunächst fragen: Was wollen wir eigentlich sein? Oder, wie Carl es formuliert: Welchen Platz wollen wir für Esperanto in der Gesellschaft haben?



Wollen wir wirklich ein Verein sein, der „aus Idealismus Projekte mit gesellschaftlichem Nutzen organisiert“? Und wo bleibt dann das Esperanto?

Denn ohne hier jetzt jemandem zu nahe treten zu wollen: Zur Kommunikation einer bundesweiten und auch einer zumindest europa- weit internationalen Organisation ist Esperanto in seiner momentanen Situation nicht geeignet.

Ich finde eher, dass bei unserer Arbeit Esperanto im Mittelpunkt stehen sollte und der gemeinnützige Aspekt eine eventuelle positive Nebenwirkung ist. Und wenn wir das nicht wollen, sollten wir vielleicht lieber nicht Teil einer Esperantobewegung sein, sondern eine Hilfsorganisation unterstützen (was ohne Frage auch toll wäre!).

Meiner Meinung nach sollte das Ziel der DEJ die Vernetzung der Esperantosprechenden Deutschlands untereinander und mit denen der ganzen Welt sein. Und dann sollte man Treffen veranstalten, die diesem Zweck dienen, und keine, die „hintenrum“ Esperantowerbung machen.

Doch die Frage nach der von uns gewünschten Rolle in der Gesellschaft lässt sich sicherlich nicht in einem Satz und wahrscheinlich nicht auf einer Seite beantworten, sondern muss entstehen in einem Prozess, in den möglichst viele Esperantosprechende Deutschlands eingebunden werden – denn nur dann können alle hinter diesen Zielen stehen und damit Außenwirkung erreichen.

Annika Förster

Stoppt die Esperanto-Krise

Esperanto stehe mitten in einer Krise, heißt es. Aber was bedeutet das überhaupt, was ist eine Krise? Eine Krise ist keine Katastrophe und auch kein Untergang. Was eine Krise in Wirklichkeit kennzeichnet, ist eine Veränderung, eine tiefe, ja, aber mehr nicht. Das ist das, was einem bewusst sein muss, um nicht in Panik und Verzweiflung zu geraten.

Sobald man das verstanden hat, hört man auf, über Krisen zu sprechen, und man fängt an, sich den neuen Zusammenhängen anzupassen. Schließlich entstehen Krisen zum Teil dadurch, dass man über sie spricht. Genauso wie bei einer Finanzkrise muss man für diese sogenannte Krise des Esperanto neue Wege und eine den neuen Verhältnissen entsprechende Zukunft finden.

Ein Beispiel dafür ist die Tatsache, dass die meisten Jugendorganisationen ihre Mitgliederzeitschriften nicht mehr per Post verschicken,

sondern online allen Interessierten zur Verfügung stellen. Leider sind diese Organisationen auch zu weit gegangen und agieren jetzt kaum mehr in der wirklichen Welt außerhalb des Internets. Alles findet im Internet statt. Darunter leiden insbesondere die Veranstaltungen, die für Neulinge von Interesse sind, wie Kekso. Dafür wird hauptsächlich –wenn nicht ausschließlich– übers Internet informiert, und das auch in einer recht passiven Art und Weise: nur der, der sich von sich selbst aus dafür interessiert, kommt zu diesen Informationen. Wonach GEJ streben sollte, ist, möglichst viele Menschen zu erreichen, und zwar ganz normale Menschen auf der Straße. Für Kekso könnten ganz einfach und günstig Hunderte von Plakaten und Tausende von Flyern gedruckt werden. Diese kann man dann hilfsbereiten Esperantisten und sonstige Freunden in der ganzen Region oder sogar darüber hinaus zukommen lassen, damit sie diese in ihren Universitäten, Bäckereien, Kirchen, Sportsvereinen usw. aufhängen und verteilen.

Reaktionen auf unsere letzte Ausgabe

Esperanto-Organisationen beklagen sich stets, dass sie immer weniger Mitglieder haben. Anderen Organisationen geht es aber nicht anders. Das ist ein klares Zeichen dafür, dass diese Krise, sagen wir lieber: diese Übergangsphase, nicht mit Esperanto, sondern mit Organisationen zu tun hat. Jugendliche identifizieren sich nicht mehr mit diesen Vereinen und mit Mitgliedschaften können sie eher wenig anfangen. Was sie brauchen, ist, eher als die Zugehörigkeit zu einer abstrakten Organisation, deren Inhalt, etwas, was sie damit machen können. Die Welt ändert sich und in unserer neuen, modernen Online-Welt ist kaum Platz mehr für veraltete Strukturen. Gerade eine Jugendorganisation wie GEJ sollte dieses anerkennen und nicht dazu streben, mehr Mitglieder in ihren Reihen zu zählen sondern daran, dass sie etwas Modernes und Attraktives zu bieten hat, denn das ist das, was Jugendliche interessiert.

Das, was GEJ zu bieten hat, ist eine Sprache mit allem, was dazu gehört: dem Kontakt zu anderen Menschen, der Kultur, einer Gemeinschaft. Und warum bietet das GEJ an? Rein, weil es interessant ist. Es ist nicht wahr, dass Esperanto unter jungen Menschen schlecht ankommt. Jugendliche sind in der Regel absolut begeistert, wenn sie an einem Kurs oder gar einer Schnupperstunde teilnehmen. Was ist also das Problem, unter dem Esperanto-Organisationen leiden? Ihre eigene Sturheit. Sie beharren

darauf, mehr Menschen zu werben, um sie in die selben verfallenen Vereine hineinzuschieben, statt tatsächlich etwas für diese Menschen zu machen. In diesem Kampf um mehr Aufmerksamkeit ist es nicht nötig, irgendwas zu unternehmen, um überhaupt gesehen zu werden. So funktioniert das auch nicht.

Nichts nützt es GEJ, einen Bandcontest oder eine Müllsammelaktion zu starten. Damit wäre nur eine kurze Erwähnung des Namens der Organisation in einer lokalen Zeitung zu lesen, wenn überhaupt. Und was können die Menschen, die sich eventuell dafür interessieren, damit anfangen? Nichts. Das wird keine Menschenhorde auf die Füße bringen, die begeistert zu Esperanto eilen. Stattdessen muss GEJ dazu stehen, wofür sie da ist: die Menschen über Esperanto zu informieren und ihnen eine Möglichkeit anzubieten, die Sprachen zu lernen. Das schafft man eben durch ansprechende Informations- und Lehrveranstaltung. Um die dafür benötigten Menschen anzuziehen, wird allein Werbung benötigt, und zwar ganz einfache, simple Werbung, die Menschen darauf aufmerksam macht, dass es Esperanto gibt, und Leute, die es sprechen.

Esperanto hat unglaublich viel Potenzial, eben weil es so wenig bekannt ist. Es liegt an den Esperantisten und besonders an den Jugendorganisationen, das zu ändern. Sinnvoll und konsequent. Es gibt keine Krise.

Federico Faccio Peláez



Somera Esperanto-Kunveno

El vidpunkto de la ĉeforganizanto

Karaj legantoj,

jene mi volas skribi miajn opiniojn kaj sentojn pri la Somera Esperanto-Kunveno, kiu okazis en Julio 2012 en Tokio.

De la komenco... Mi alvenis en Japanio en Marto 2012 por studi tie (interŝanĝ-semestro) en la universitato de Tokio (Todai). Apud la studo mi havis la ideon kaj emon ankaŭ fari ion por la junulara Esperanto-movado en Japanio, ĉar ĝi ŝajnis al mi ne tro stabila. Mi ofte renkontiĝis kun diversaj homoj, kiujn mi konas de „iuj anguloj“, kaj finfine venis al la konkludo, ke estus bone organizi en Japanio etan renkontiĝon por junuloj kiu povos fortigi la organizan strukturon inter japanaj junuloj kaj ankaŭ vekii intereson de ne-Esperantistaj junuloj en Japanio pri Esperanto.

Kien do iris la vojo? Unue gravis trovi organizan teamon, kio komence al mi ŝajnis facile. Mi demandis diversajn junulojn (kio signifas en Japanio: homoj sub 35 jaroj) el diversaj grupoj, organizoj aŭ simple amikojn de amikoj. Tiel do baldaŭ mi ektrovis ĉirkaŭ 10 junulojn (aŭ junajn homojn) kiuj ŝajnis estis entuziasmaj pri organizado de esperanta evento...

Kiel mi en la venontaj semajnoj konstatis, la simpla buŝa „jes mi faros“ de japanaj junuloj signifas ne multon, do estis longa vojo ĝis mi povis trovi fiksan organizan teamon, en kiu eblis „normale“ kunlabori retmesaĝe, renkontante kaj telefone aŭ foje skajpe.

Finfine venis la tago de la evento, kaj la vojo estis preparita bone, tiel ke ĉio povis iri kiel planite kaj foje ankaŭ spontanee. Ĉiam okazas aferoj, kiujn oni ne antaŭvidis, kaj gravas, tiujn laŭeble senstreĉe kaj tamen konscie pritrakti kaj solvi. Laŭ mi en Japana Esperanto-renkontiĝo plej gravas la programo, kiu devas esti serioza (lingvokursoj, prelegoj ktp.) kaj aliflanke mojosa (koncertoj, drinkado, manĝado, umado, ...). Aliflanke ankaŭ gravegas internaciaj partoprenantoj (japanoj ĉiam estas ĝojaj vidi kaj alparoli eksterlandanojn), do tial la varbado devas okazi tra ĉiuj eblaj kanaloj.

Pro mona subteno de la Germana Esperanto-Junularo (GEJ) de 2000 € eblis, feliĉe pli facile plani programerojn kaj tiel havi en la unua vespero sukcesan kaj bonegan koncertan vesperon de Jonny M. (Germanio, <http://www.jonny-m.org>) kaj Eterne Rima (Pollando/Japanio, www.facebook.com/eterne.rima) kun subteno de mi kiel diskĵokeisto (Dj Leo/Jampgade, www.jampgade.de).

Fine de la aranĝo mi petis la partoprenantojn pri opinioj pri la aranĝo, kiuj ĝenerale sonis pozitive. Kio speciale ĝojigis min, estis la frazo: „...la SEK sentigis min estis en Eŭropa IJK...“. Tio montras, ke la aranĝo havis internacian etoson, ĉar la junuloj havis la senton, vere esti en Esperantujo kaj ne en iu malmojosa evento.

En tiu punkto mi volas denove elkore danki al ĉiuj organizantoj de SEK, kun kiuj ni havis interesan tempon antaŭ, dum kaj post la evento. Krome ankaŭ dankon al la kursgviganto, programergvigantoj kaj ĉiuj subtenantoj kaj partoprenantoj de la SEK.

Konkludo:

Se vi volas organizi eventon en Japanio, trovu bonan organizan teamon (kiu konscias esti organizanto) kaj ofte renkontiĝu. La vid-al-vida parto de preparado ege gravas kaj sen ĝi estas malfacile, libere kaj amike komuniki.

Krome gravas, ke la taskoj (de la organizantoj) estas klare dividitaj, sed ankaŭ gravas fleksebleco en iu senco por foje ankaŭ plenumi aliajn taskojn. Se la organiza teamo konsistas en internacia teamo (kiel dum la SEK), la evento ankaŭ havas pli vastan kaj internacian karakteron. Ĉiam do provu havi eksterlandanojn en via organiza teamo, aŭ almenaŭ konsiliĝi kun iuj.

Plej gravas amikeca kaj paca kunlaboro, kaj malhelpas malamo inter homoj aŭ iuj ekzistantaj antaŭjuĝoj pri iu(j).

Laŭmiĉiamindaspartoprenienjunularaj Esperanto-eventoj, ĉar ĉiuj estas malsamaj kaj ĉiam oni eksentas novan UNIKAN (-;) etoson inter aliaj homoj.

Belajn salutojn el mia vilaĝo en Germanio (kun 360 loĝantoj, iom malpli ol en Tokio ^_^),

Leo Sakaguchi



Hinweis zur Fahrtkostenrückerstattung

Mitglieder der DEJ, die auf einige internationale Treffen fahren, haben bekannterweise die Möglichkeit, sich die Fahrtkosten zurückerstatten zu lassen.

Wir möchten dazu aufrufen, diese Möglichkeit auch zu nutzen und entsprechend auf die Fahrkarten, die (bzw. deren Kopien) zu diesem Zweck eingereicht werden müssen, aufzupassen. Als gemeinnütziger Verein können wir die Subventionen, die u.a. zu diesem Zweck verwendet werden, nur weiterhin empfangen, wenn sie auch ausreichend benutzt werden. Also – lasst euch eure Fahrtkosten zurückerstatten, und alle haben was davon.

Mallongaj novaĵoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO)

Muziko de Johannes Mueller – registraĵoj kaj koncertoj

Nova retejo pri mia muziko: <http://muziko.johannes-mueller.org/>. Tri kantojn mi jam enmetis kun tekstoj. Pliaj sekvos en la venontaj semajnoj. Ĝuu la aŭskultadon.

„Signoj de viv“ de Initialoj D.C. aperis

Vi povas aŭskulti du pecojn kaj mendi la albumon! Aŭskultu: <http://initialsdc.bandcamp.com/album/signoj-de-viv>

Budo pri Esperanto en Kairo, Egiptujo

La Araba Komisiono dankis al TEJO, kies reprezentanto en Kairo en kunveno inter organizaĵoj, trovis la tempon por starigi budon pri Esperanto kun arablingvaj materialoj. La reprezentanto de TEJO tie estis Michael Boris Mandirola. **EI TEJO-aktuale**



Trovitaĵo: Partoprenantoj de la Komuna Esperanto-Kongreso 2012 en Berlin demandas sin, kio en tiu ĉi domo povos okazi. Foto: Fritz Wollenberg

·kune· estas la komuna membrogazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: Miriam Hufenbach, Carl-von-Ossietzky-Straße 55, 09126 Chemnitz, Germanio.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Carl Bauer

Pliaj estraranoj: Liesa Marie Alfier, Clemens Fries, Miriam Hufenbach, Alexander Kozak, Alina Labitzke kaj Leo Sakaguchi

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>

90a Germana Esperanto-Kongreso

17.-20.05.2013

Temo: Pioniroj kaj vizioj

Atentu! Eblas ankaŭ aliĝi rete ĉe
<http://esperanto-nuernberg.de/gekanm/alighilo.html>

Mi aliĝas al la 90a GEK en Nurenbergo

nomo [I] [K]

kunulo(j) [I] [K]

strato [K]

poŝtkodo, urbo [I] [K]

telefono [K]

retadreso [K]

Bonvolu marki la informojn, kiuj aperu [I] interrete en la listo de aliĝintoj kaj/aŭ [K] en la kongreslibro!

Partoprenkotizoj (aliĝo ĝis 15.01.2013)

ne membro de GEA/GEJ 80 (60*) €

**ordinara membro de GEA/GEJ
 aŭ loĝanta en eksterlando 50 (30*) €**

patrona membro de GEA 20 (0*) €

taga karto (sabato aŭ dimanĉo) 30 (20*) €

ekde 16.01.2013 ĝis 31.03.2013 +15 (+10*) €

poste aŭ surloke +35 (+25*) €

* La prezoj interkrampe validas por:
 samadresa kunulo, B-landano, handicapulo (atestilo),
 junulo (*01.01.1986-31.12.1997), senlaborulo (Alg II).
 Infanoj partoprenas senpage.

Loĝado CPH Ibis A&O

tagoj: (Ĵa) Ve Sa Di

prezoj por 1 persono / 1 nokto kun matenmanĝo:
 1a prezo en 1-persona ĉambro / 2a en 2-pers. ĉambro

Hotelĉambrojn ni mendos nur post kompleta pago!

Kongresejo CPH 50 / 31 €

Ibis Hotel 62 / 37 €

A&O Hotel 53 / 35 / 27* €

* 4- aŭ 6-lita ĉambro

komuna tagmanĝo en CPH (po 11 €)

tagoj: Sa Di Lu
 vegetara vegana €

ekskurso(j): €

donaco al la kongresa kaso €

Sume _____ €

La aliĝo validas nur post pago de la kotizo.

Ĝi transdoneblas al alia persono, sed nur kun adaptito supren de la pago. Bv. kontakti nin laŭbezone.

Mi pagis je dato kun mencio:

Deutscher Esperanto-Bund, Sozialbank Mainz
 Konto: 860 360 2, BLZ: 550 205 00

UEA-konto: GEAA-N

Mi deziras loĝi kun

Mi kontribuos al la programo (vidu sube)

Mi petas ĉambrojn por faka kunveno (vidu sube)

Mi petas tablon en la movada foiro (vidu sube)

Mi pretas helpi ĉe la sabata informstano

Mi ĉeestos la urbestran akcepton (vendredon ptn)

Ekskursoj

La nombro de partoprenantoj estas limigita por ĉiu ekskurso. La dimanĉaj ekskursoj okazos paralele, do vi povos partopreni nur en unu. Tial ĉe ili bonvolu indiki per cifero 1 tiun, kiu estas via preferata, kaj per 2, 3, ... eblajn alternativojn, se via 1 jam estas plena. Ju pli frue vi aliĝas, des pli granda la elekto.

Tri en bulko ... (dimanĉo, 10 €)

Ludilmuzeo (dimanĉo, 10 €)

Subterejo (dimanĉo i, 10 €)

Trafikmuzeo (dimanĉo, 10 €)

Bamberg (dimanĉo, 15 €)

Faber-Castell (dimanĉo, 10 €)

Albrecht Dürer (sabato, 8 €)

Nokta ĉielo (sabato kaj/aŭ dimanĉo vespere, 8 €)

Turo de la sensoj (lundo, 8 €) **nova**,
<http://www.turmdersinne.de/eo/home>

Bonvolu ĉi tie aldoni viajn rimarkojn. Dankon.

.....

Bv. sendi al:

Esperanto Nürnberg
Moritzbergstr. 37
90482 Nürnberg
Tel. +49-(0)911 / 5 06 34 73
gek2013@esperanto.de

Nurenbergo

www.esperanto-nuernberg.de

ekskurse

Tri en bulko sur roka monto



Indiĝeno montros al vi ne nur la kastelon, sed ankaŭ aliajn vidindajn ejojn, aĵojn kaj umojn, kiujn ordinara turisto facile maltrafas.



Ludilmuzeo

Nurenbergo portas la kromnomon -ludilurbo-, do ekskurso al la ludilmuzeo ja ne povas manki. Laŭ la eksponaĵoj vi ekscios pri la signifoj kaj evoluo de diversaj ludiloj tra la epokoj. La muzeo konservas imponan kolekton da pupodomoj kaj ladaĵ ludiloj.



Trafikmuzeo DB



Emerita inĝeniero gvidos vin tra la muzeo, kiu prezentas interalie la plej grandan kolekton da historiaj fervojaj veturiloj en Germanio.



Faber-Castell

Vizitu la pioniran produktanton de skribiloj Faber-Castell. Tiu ĉi ekskurso estos **en germana lingvo**, ĉar dungito de la entrepreno gvidos vin. Kuniros helpanto, kiu interpretos laŭbezone.



Domo de Albrecht Dürer

La domo de Dürer travivis la duan mondmiliton sen grandaj damaĝoj kaj konservis la etoson de antaŭaj tempoj. Post prelego pri la granda artisto, ni prezentos al vi la domon, kie li vivis kaj verkis.



Monda kultura heredaĵo Bamberg



Rigardu la tradician ĝardenistan kulturon (oni kultivas eĉ glicirizon – unike en norda Eŭropo). Promenu tra la komercista kaj la fiŝista kvartaloj ĝis la eklezia kvartalo kun la katedralo. De la roza ĝardeno ĝuu la panoramon de la urbo.

Nurenberga subterejo

Vidu Nurenbergon de tute nekutima flanko. Esploru iamajn bierkelaron, bomboŝirmejon kaj fabrikon. Fine vizitu la unuan ekologian bierfarejon de Germanio.



Nokta ĉielo

Se la vetero permesas, hobia astronomo akompanos vin al la Nurenberga observatorio. Ekkonu la konstelaciojn kaj malkovru forajn galaksiojn aŭ la ringojn de Saturno per la granda teleskopo.



90a GEK 17.-20.05.2013